GISTO, 0209
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktas ottovaske@ibest.com.br
Bulteno donace disdonata dum la Verda Kafo
Ĉeestavaruloj ŝuldas la koston, R$ 01,00

.....

NI ZORGU TREE!

Dum ni kunsidas ĉe Verda Kafo bonvenas eviti ke, pro atento al vizitant(in)o, oni estu devigata tro longe krokodili. Dum kontakto kun influhava ĵurnalisto, en mia urbo, li promesis stimuli kolegojn el Porto Alegre, ke ili iam iru renkonte al nia kunsido, por eble rikolti donitaĵojn pri nia tradicia evento. Eblas ke el tio rezultos teksto niafavora en grava ĵurnalo, ĉefe se ĉiuj ni diligente, laŭte kaj klare parolos nur la lingvon. Povus okazi ke iu ĵurnalo mendos rezulton post sekreta sondado. Do, ĉiuj tenu la okulojn plej atentaj por, se eble, identigi ĵurnaliston apude. Tiaokaze bele efikus se unu el ni laŭtlegus E-tekston aŭ deklamus poezion. – Jen, denove mi insistas, ke oni devas adopti la kutimon kunporti unupaĝan tekston pri ero spertinta dum la monato aŭ parkerigi ion. Se en la ejo ne troveblas sufiĉe granda nombro da klientoj, oni preterlasu la montron, ke ni vivas kaj agas. La ne legitaj tekstoj restu ĝis venonta okazo.

ŜATANUGA

Ne ektimu, kara leganto, via enkapa e-vortaro ne kurtas. La titolo estas kuriozaĵo. Eblas ke, kiam vi studis geografion, vi sciis la indiĝenan nomon de lago kiu situas inter Kanado kaj la norda regiono de tiu frida mondoparto. Ĉirkaŭ ĝi loĝis multaj fiŝkaptistaj familioj kaj ofte okazis seriozaj kvereloj pro kaptejoj elektitaj, pro problemoj okazintaj per fiŝistaj ilaroj, perditaj(?), ktp. Do ties ĉefoj iam ariĝis kaj dekretis: de nun neniu fiŝkaptos en la mezo de la lago. De tiam la mallongigo Ŝatanuga, restas la indiĝena nomo, kun la signifo: Vi Fiŝkaptos Viaflanke, Nia Grupo Fiŝkaptos Niaflanke kaj Neniu Fiŝkatos en la Mezo. – Tiel la najbaroj de jarcentoj daŭrigas pacan kunvivadon.

ĈRI

De pluraj semajnoj la forta signalo de ambaŭ bendoj de Ĉina Radio Internacia (7320 kaj 9860 Khc) alternas sed 7320 ĝenerale havas la signalon S-9, ofte iom pli forta, komforte komprenebla. Mi esperas ke niaj amikoj Olavo Faŭstino kaj Nédio L.Roza, kiuj notis al si la R-frekvencon dum nia lasta VK, sukcesis ĝui la belajn paroladojn inajn kaj virajn, kun plejzorga prononco.

E-MAIL

Mia komputilo baŭmas. De pluraj tagoj mi ne povas legi la alvenenintajn mesaĝojn. Laŭ onidiroj la gaŭĉaj servejoj fuŝas la komunikadojn de homoj kiuj ne posedas larĝan bendon por, per tio, malrekte devigi malriĉulojn kontrakti laŭ monataj kotizoj por specifa servejo. El tio rezultas: pagi aŭ suferi senkapigon...!

ENKETO

Al ĉiuj gaŭĉaj gesamideanoj mi petas la favoron iel manifestiĝi al mi pri sia ebleco partopreni de komuna tagmanĝo, en labortago.BV diri la preferatan tagon de la semajno, meze de la dua plena semajno de majo/09. Ĝi estos simpla manĝo kaj devos okazi en memserva manĝejo, laŭ mia plaĉo, en PANELA DE BARRO, str.Marechal Floriano nº 72, POA. Domaĝe ĝi ne malfermiĝas sabate. Se tro malmultaj gesamideanoj havas eblecon semajntage ĉeesti, oni elektu alian manĝejon. Pliajn detalojn, pli poste.

ESTINGOMINACO (CP,2209)

Laŭ UNESKO, el 2500 lingvoj kiuj povos estingiĝi, 190 apartenas al Brazilo, se kalkuli tiuj parolataj de indiĝenoj, kiel la "maŭajana" aŭ la "kajŝana. Regionoj kun pli grandaj kulturcentroj plej minacas minoritatajn idiomojn. Laŭ la informo, de 6700 aktivaj lingvoj, 200 malaperis dum la lastaj 100 jaroj, 538 situas en danĝero kaj 199 uzatas de malpli ol 10 homoj. Do, karaj kompanoj, ni laboru pli streĉe, por saciigi la minoritatanojn ke Esperanto batalas iliafavore.

MANĜA HIGIENO

Vi konstatas ke, kiam vi trinkas, ne estiĝas salivo en la buŝo. Sed, salivo estas grava parto de la digestaj ingrediencoj, laŭ instruas nutristoj. Oni devas trinki iometon tuj post la tagmanĝo (kafeton, vingluton) kaj sate trinki nur du horojn poste. La fikutimo manĝi, kun glaso da likvaĵo ĉemane estas kutimo "trudita" far ĉefkelneroj, por ke vi nepre mendu botelon da (prefere) multekosta trinkaĵo laŭ via bontrovo, cele plenigi la kason de la manĝejo. Prefere oni fariĝu vegetarano. Adoptintoj de ties dieto ne troe kverelas, malpli postulemas, estas pli konsentemaj homoj. Cetere memorindas ke, tera areo necesa por bredi unu bovon sufiĉas por nutri 16 homojn.

KOSTINJA

Miaj karaj junaj geamikoj, vi estis beboj kiam la humuristo Kostinja furoradis tra aŭditorioj radiaj kaj teatrejaj, per siaj pipre spicitaj anekdotoj. Mi kredas, multaj el vi unuafoje legas ties spritaĵojn, tial riskas proponi kelkajn retrovitajn meze de malnovaj libraĉoj:

..... Linda turista ino argentina alvenis ŝipe al RIO kaj tuj je la unua vespero ŝi estis priŝtelita kaj perdis ĉiujn siajn dolarojn kaj dokumentojn. Senespera ŝi restis apud la haveno sen scii, kion fari.

Maristo alparolis ŝin kaj proponis helpon, por reirigi ŝin al Bonaero. "Pli poste ni kaŝe eniros ĉi ŝipon. Mi havas kaŝejo por vi kaj je ĉiu manĝo mi alportos vian porcion. De vi mi nur postulas karesojn". Tiel okazis ke, ĉiufoje la maristo aranĝis la manĝaĵojn kaj reciproke ricevis amorajn karesojn. Forpasis semajnoj, forpasis monato. La ino decidis konfesi ĉion al la komandanto. "Via estorio kortuŝas min" konsentis li "sed mi ne povas ŝanĝi vian sorton. Ĉi ŝipeto estas unu el la barkoj kiuj interligas Rio kaj Niteroj' .

PLENDO

Dommastrino plendas al la konstruinto de ŝia domo: "la tuta konstruaĵo tremas tiome ke mi preskaŭ falas el mia lito, kiam la trajno pasas 20m for. Vi eble ne kredas min sed bonvolu kuŝiĝi en mian liton". La konstruisto, iom ĝenate konsentas. Apenaŭ li kuŝiĝis, kiam ŝia edzo eniras la dormoĉambron "Kion vi, aĉulo, faras tie?" – "Vi certe ne kredos, sed mi atendas la trajnon".

TENTA PROPONO

Meze de defilo "Miss Brazil",sinjoro ŝike vestita grimpas la tablon ĉe kiu li aprecadis la konkurson kaj laŭte anoncas:

"Tri mil dolarojn mi proponas al tiu el vi kiu kandidatas amoradi kun mi laŭ mia maniero, dum unu vespero". Antaŭ ol iu povis reagi li forlasas la ejon kaj atendas apud la elirejo. Fine de la prezentado unu el la junulinoj alparolas lin kaj sekretumas al li, ke ŝi konsentas pri lia propono. Ili veturas al hotelo, kaj ĝuas paradizan kunestadon. Frumatene ŝi postulas de li la plenumon de lia propono. Li klarigas al ŝi: "Mia maniero signifas:kredite"

ANTAŬEDZIĜA SEKSO

Gefianĉa paro staras antaŭ la parokestro kaj kombinas sian edziĝan ceremonion. La fianĉino maltrankvila demandas: "kion vi opinias pri sekso antaŭ la edziĝo?" Dom Pilato, certagrade moderna sed distriĝema respondas: "Eventuale feliĉigas sed povas prokrasti la ceremonion". – Aŭ, entute por ĉiam forgesi ĝin en nia moderna mondo kie knabinoj vartas siajn bebojn kaj/aŭ junuloj ŝanĝas sian paron samfacile kiel vi anstataŭas ĉemizon – aldonas mi.